

Pretige al elsendaro pri esperanto-studado: referenciloj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.11.21 & 23

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La korespondaĵoj, kiujn ni ricevis dum tiu ĉi jaro preskaŭ unuanime montris grandan interesiĝon pri lingvaj demandoj kaj ĉefe helpdeziron en la elstudado de Esperanto.

A.- Multaj geaŭdantoj estas izolitaj homoj, kiuj memlernis la lingvon kaj kelkfoje baraktas koncerne nesolvitajn gramatikajn demandojn. Malmultaj havis la ŝancon partopreni veran perfektigan kurson universitat-nivelan, tial ofte esprimiĝas antaŭjuĝoj, kiuj enradikiĝis en esperantujo kaj malhelpas objektivan kaj senemocian aliron al la lingvo.

Cl.- Ekzemple pri la nocioj logiko, lingvo-evoluo, vortara riĉiĝo, gramatika reguleco kaj pri la konsisto kaj rolo de la Fundamento de Esperanto ni sentas, ke malmultaj skribintoj estas reale dokumentitaj. Tamen la plimulto el ili jam troviĝis eĉ plurfoje en la tikla situacio, ĉu instrui la lingvon al komencantoj aŭ eĉ al progresantoj, ĉu rebati argumentojn de kontraŭuloj, ĉu redakti organon de societo kaj tiucele devi korekti artikolojn lingve ne kontentigajn.

A.- Ĉiuj iam sentis la bezonon enprofundiĝi en la studadon de la lingvo kaj de ties karakterizaĵoj vortfaradaj, stilaj, beletraj kaj ideologiaj. Al tiu ĉi publiko ni dediĉos ĉi-vintre elsendaron, kiu havos karakteron instruan kaj metodikan. Ĝi do samtempe konvenos al progresantoj, al instruantoj kaj al redaktoroj de bultenoj.

Cl.- Ni volonte sendos fotokopion de tiu elsendaro al tiuj, kiuj perkoresponde petos ĝin al la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia, 3000 Berno 15, Svislando.

A.- Sed ni ne tedu pli longe la geaŭdantojn per tiuj enkondukaj konsideroj. Permesu precizan demandon: Kiun materialon vi konsilas posedi por aktive partopreni la proponitan elsendaron?

Cl.- Unue ĉiu disponu je kajero kaj skribilo, por povi noti studotajn frazojn, referencojn kaj proponitajn taskojn. Mi ŝatus, ke ĉiu aŭskultanto povu esti aktiva. Atendante la venontan elsendon li aŭ ŝi antaŭlegu studotan tekston laŭ juĝ-kriterioj, kiujn ni proponos.

A.- Do vi vin bazos sur kelkaj dokumentoj. Estus bone listigi ilin, ke ĉiu povu fari la neceson por havi ilin submane.

Cl.- Jes, mi konsideras, ke oni ne povas progresi en la ellerno de Esperanto, se oni ne povis atente trastudi kelkajn bazajn verkojn, kiujn mi listigos. Ho mi scias, ke ilia akiro en kelkaj landoj estas malfacila, tamen mi estas certa, ke ĝi restas ebla. La proponitaj libroj ne estas elĉerpitaj kaj devus troviĝi en ĉiu libro-servo kaj sur ĉiu librobreto de konscia esperantisto. Ili estas perkoresponde aĉeteblaj ĉe la libro-servo de UEA, kiu certe havas kontojn en diversaj mondo-partoj.

A.- Oni povas eklerni la lingvon sen libro, sed oni ne povas ellerni ĝin sen libroj, ĉu ne?

Cl.- Tute ĝuste! Mi eĉ diros, ke la eklerno senlibra estas preferinda al la lernolibra. La esperanto-junularo sufiĉe lertas en la lingvo-praktiko, ĉar ili ĉefe renkontiĝis kun la lingvo en paroligaj situacioj. Sed necese alvenas la momento ekskribi ion, kaj tiam la koncernatoj sentas

la bezonon precizigi kaj sistemigi siajn sciojn. Nur la konsulto de referenciloj ebligas eliri el la eklerna situacio.

A.- Kiuj estas tiuj referenciloj?

Cl.- Por la ĉi-vintra elsendaro, ili estos du. Unue la **Fundamento de Esperanto**, seeble en la ankoraŭ aĉetebla naŭa eldono de 1963 kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de d-ro Andre ALBAULT. La restanta stoko de tiu produkto de la malaperinta eldonejo Esperantaj Francaj Eldonoj en Marmande, Francio, nun troviĝas en La Chaux-de-Fonds ĉe Kultura Centro Esperantista. Ĝi estas aĉetebla kontraŭ 15.- svisaj frankoj, al kiu aldoniĝu 5.- frankoj por la sendokostoj.

A.- 20.- svisaj frankoj faras proksimume 15.- usonajn dolarojn.

Cl.- Alia baza libro estas la vortaro **Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento** eldonita de SAT. Ĝi estas la antaŭulo de **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**, kiu estas tro kosta-por troviĝi sur la skribotablo de ĉiuj esperantistoj. Kiuj posedas tiun pli kompletan vortaron, tiuj povos ĝin konsulti anstataŭ la pli malkompletan kaj malmultekostan vortaron.

A.- Kio estas la kosto de **Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento**, kiun vi proponas?

Cl.- Tiu preskaŭ sescentpaĝa libro, kies lasta eldono datumas de 1980, kostas 24.- svisajn frankojn.

A.- Do 9.- svisajn frankojn pli aŭ 6 usonajn dolarojn pli, ol **Fundamento de Esperanto**.

Cl.- Jes ! Nur tiujn du bazajn librojn ni nepre bezonos por nia kurso. Kelkajn tekstojn ni ĉerpos el aliaj ĉefe beletraj verkoj divers-epokaj. La ŝancaj posedantoj de la koncernaj libroj povos pli facile orientiĝi. La aliaj seeble registru la citaĵojn, kiujn ni malrapide laŭtleĝos. Tiel ili povos ilin transskribi. Tiuj citaĵoj neniam estos longaj, sed karakterizaj je la lingva punkto, kiun ni ekzamenos.

A.- Kaj, kiel vi diris, vi havigos fotokopiojn de niaj prelegoj al la petintoj. Tiel ĉion ili povos relegi.

Cl.- Jes, kaj tiun sendadon ni efektivigos per pluraj dissendoj, ke la unuaj petintoj posedu iom post iom la tutan prelegaron, sen atendi la konkludon de la elsendaro. Sed nun post tiu dua enkonduka parto mi faros kelkajn demandojn, al kiuj ni respondos nur la venontan semajnon, kun la espero, ke niaj geaŭdantoj provos mem trovi la respondojn.

A.- Unua demando:

Cl.- La verko **Fundamento de Esperanto** komenciĝas per **Antaŭparolo**. Ĉu vi povas reciti la unuan frazon de tiu gravega dokumento?

A.- Se ne, alvenis la momento trovi ĝin, kaj parkeri ĝin.

Cl.- Jes, en ĉiu socio oni konu parkere kelkajn fundamentajn aŭ historiajn tekstojn, kaj tiu unua frazo de dokumento al kiu konstante referencas la esperantistoj, estu gravurita en ĉiu memoro.

A.- Ni ripetas tiun unuan demandon: Kiel tekstas la unua frazo de la **Antaŭparolo** al la libro **Fundamento de Esperanto**?

Cl.- La dua demando koncernos la Fundamenton mem. En kiom da lingvoj ĝi estis publikigita? kaj kiuj estas tiuj lingvoj?

A.- Mi ripetas la duan demandon: En kiom da lingvoj estis puiblikigita la **Fundamento de Esperanto**? kaj: Kiuj estas tiuj lingvoj?

Cl.- Ĉiuj esperantistoj rakontas, ke la esperanto-gramatiko konsistas el 16 reguloj. Fakte tio estas la 16 punktoj de la partoj dediĉitaj al la parolo. Kio estas la temo de la unua regulo?

A.- Mi ripetas la trian demandon: Kio estas la temo de la unua el la 16 reguloj de la Fundamento de Esperanto?

Cl.- Karaj aŭskultantoj, ni esperas, ke vi povos trovi la respondojn al tiuj tri demandoj ĝis la venonta semajno, kiun ni dediĉos al ekanalizo de la Fundamento de Esperanto. Ĉiu provu respondi, antaŭ ol malfermi la libron, kaj poste kontrolu la ekzaktecon de siaj respondoj. Kaj ĉiu dediĉu iom da tempo al la tralego de tiu ĉiam aktuala, do ne nur historia libro.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Prelegis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis reaŭdo!